

*Ida Stria*

*Uniwersytet Warszawski, Pollando / Poland*

## **Recenzo de la libro**

**Fiedler, Sabine, kaj Cyril Robert Brosch. 2022.**  
***Esperanto – Lingua Franca and Language Community.***  
**(Studies in World Language Problems 10.)**  
**Amsterdam kaj Philadelphia: John Benjamins.**  
**<https://doi.org/10.1075/wlp.10>**

Se mi devus resumi la recenzatan libron en unu frazo, mi dirus, ke ĝi estas ĉio, kion lingvisto devas scii pri la nature funkcia planlingvo Esperanto. Ĝi fakte prezentas al la leganto detalan enrigardon en la funkciadon de la lingvo surbaze de tute nova, ampleksa materialo.

La aŭtoroj estas agnoskitaj lingvistoj, kiuj jam de jaroj esploras pri Esperanto. La recenzata libro estas la rezulto de plurjara laboro kadre de granda eŭropa projekto MIME (Mobility and Inclusion in Multilingual Europe), en kiu la lepsika universitato respondecis pri la studado de la angla kiel interlingvo por Eŭropo. Esperanto venis do nature en la projekton kiel alternativa ilo de komunikado.

La libro enhavas 30 ĉapitrojn en kvin partoj kun ampleksa bibliografio, du apendicoj kaj registro. La unua parto enkondukas la titolajn konceptojn: Esperanton kaj lingvafrankaon. En ĉapitro 1 la aŭtoroj notas, ke la lingvo estas de ekstera publiko ne tre vaste konata kaj kondemnata kiel ne viva, ne funkcia kaj malsukcesa. Tiujn miskonceptojn la libro refutas per analizo de kolektita materialo laŭ sciencaj, lingvistikaj metodoj. Oni devas menci, ke la ilaro jam multajn fojojn estis aplikata al diversaj lingvoj, kompreneble ĉefe al la angla (ĉiuokaze mi demandas min, ĉu tamen vere Esperanto meritas intereson nur pro la fakto, ke ĝi same povas esti studata kiel ĝia konkurenco). La ĉefa celo de la libro estas “montri, kiel Esperanto funkcias kiel lingvo en praktika uzo” (Fiedler kaj Brosch 2022, 3). Tiu ĉi celo estas plidetaligita en ĉapitro 4, kie la aŭtoroj starigas la jenajn esplordemandojn pri Esperanto:

- Kie, en kiuj situacioj estas uzata Esperanto nuntempe?
- Kiel Esperanto-parolantoj alfrontas komunikadajn problemojn?
- Ĉu estas diferenco inter Esperanto parola kaj skriba?
- Ĉu Esperanto estas pli facila?

Krome oni provas respondi al la pli ĝeneralaj sed fundamentaj demandoj pri komunikado helpe de interlingvo, nome pri la diferencoj inter lingvafrankaoj, influo de propra esperanta kulturo kaj eksterlingvaj ecoj kaj pri normigo kaj lingvoposedo en lingvo sen denaskuloj. Tial la aŭtoroj demandas ne nur pri Esperanto mem, sed pri tio, kion oni povas lerni analizante artefaritan lingvon, kiun oni ĝenerale konsideras ne indan je atento.

Neniu, kompreneble, povas konsideri ĉiujn aspektojn. La aŭtoroj ne parolas, ekzemple, pri la eventuala influo de fonaj lingvoj kaj kulturoj de Esperanto-parolantoj – ili mencias tion en la konkludo, konsciante, ke estonta studo de tiu ĉi aspekto kontribuus al pli bona kompreno de la sintenoj kaj komunika konduto de la komunumo.

La venontaj analizoj kompletigas jam ekzistantajn interlingvistikajn studojn, kiuj estas koncize prezentitaj en ĉapitro 3. Ĉapitro 4 prezentas metodojn kaj datumojn kaj 5 la strukturon de la libro. La materialo estas korpuso de aŭtentaj parolaj registraĵoj de la jaroj 2014–2018.

La dua parto estas rapida vojaĝo tra Esperantolando, tio estas, prezento de la historio, ideologio, strukturo kaj uzo de Esperanto. Cetere la aŭtoroj decidis enkonduki la temon tra informoj pri interlingvistiko kaj artefaritaj lingvoj. Mi samopinias kun Jouko Lindstedt (2022), ke la ĉapitro estas pli ampleksa ol ĝi estus por etnolingvoj, ĉar “oni ne povas premisi iajn ajn antaŭajn sciojn pri la temo [Esperanto]”, kio ankaŭ estas la kialo por la ĉiama teda “deviga ĉapitro pri aprioraj filozofiaj planlingvoj”.<sup>1</sup>

La tria parto, kvankam interesa aldonajo, ŝajnas al mi nenecesa. Ĝi fakte kontribuas al la bildo de Esperanto kiel kuriozaĵo, arta provo aŭ ne tute serioza kreaĵo, kvankam la aŭtoroj montras, ke la konotacioj estas tre ofte pozitivaj. La kvara parto, aliflanke, estas la pinto de la studo. Ĝi prezentas tre zorge prilaboritan analizon de komunikado en Esperanto kun la ĉapitroj pri metakomunikado, reciproka kompreno tra komunikaj riparoj, humuro, frazeologio kaj metaforoj, lingvoalternado kaj -miksado, skriba kaj parola Esperanto, sintenoj al akĉento, lingvoŝanĝiĝo kaj fine Esperanto kiel laborlingvo. Oni povas legi tiun ĉi parton, havante enkaŭpe du perspektivojn samtempe: ke Esperanton oni povas analizi kiel lingvafrankaon kaj kiel lingvon “enkomunuman”. Tre ĝuste la aŭtoroj indikas, ke en Esperantujo ekzistas kaj batalas kontraŭ si du tendencoj: unu estas grupolojaleco (*ne krokodilu!*) kaj la dua malfermiteco kaj akomodigo de ĉiaspecaj homoj en diversaj niveloj de Esperanto, kun malsamaj lingvaj spertoj kaj fonoj.

Certe el la vidpunkto de internacia komunikado valoras atenton la subĉapitroj pri riparoj (19) kaj lingvoalternado kaj lingvomiksado (22) –

1 Mi grandparte konsentas kun la observoj de Jouko Lindstedt, sed la fokuso de mia recenzo restas aliloke.

ili montras, ke esperantistoj strebas al la pli bona komunikado kaj interkompreno. Samtempe kiam oni konsideras Esperanton kiel lingvon por interna uzo en sia komunumo aŭ emas kompari ĝin kun etnaj lingvoj, venas al helpo la ĉapitroj pri humuro (20) kaj frazeologio (21).

Al mi ĝenerale mankas klara distingo inter tiuj du perspektivoj. La titolo estas duelementa kaj la demandoj pri la du donas malsamajn respondojn kaj servas aliajn celojn. Aperas subĉapitroj, kiuj mencias identecon, sed sen sufiĉe bonaj ekzemploj – oni ripetas ne tre esploritajn tezojn pri la malfermiteco kaj tuja memidentigo kun la komunumo (mi mem ne estas senkulpa). La aŭtoroj verŝajne traktas Esperanton ĉefe kiel lingvafrankaon kaj tial la fokuso forkuras de la identiga valoro.

La analizo estas tre kompleksa kaj valora, mi tamen reagis dubeme en kelkaj lokoj. Eble tio estas vojmontrilo por estontaj esploroj? En la ĉapitro pri riparoj la aŭtoroj konstatas, ke la probabla kialo por troa ĝusteco estas sufiĉe facile atingebla precizeco en fremdlingva komunikado. Mi demandas min, ĉu eble ne la dua flanko de Esperanto-komunikado, nome lingvolojaleco, eĉ foje kvazaŭfanatika. Esploroj montras, ke “bona Esperantisto” estas tiu, kiu bone esprimas sin (Stria 2017). Lingvoposedo, memidentigo kaj komunumo-aparteno povas do dependi de la grado de flueco kaj strebo al preciza kaj bona komunikado esti strebo al aparteno.

Flanke mirigas min la hipotezo, ke “iu, kiu lernis la anglan, francan aŭ germanan dum tri jaroj kaj duono, ne kapablus tiel bone esprimi sin” (p. 127). Oni pensu pri studentoj de filologioj, kiuj post 3 jaroj de bakalaŭraj studoj devas atingi la nivelon C1.

En ĉapitro 20, kvankam la aŭtoroj konvinkas la leganton, ke Esperanto-parolantoj “apenaŭ povas rezisti ŝancon por spontanea vortludo dum interagado” kaj havas “inklinon al ludema konduto” (p. 190), ili samtempe, kvazaŭ atendente kritikon, montras ankaŭ la malsukcesajn provojn de humuro. Mi bedaŭrinde ne trovis specimenon (225), al kiu la aŭtoroj referencas sur paĝo 191 kiel ekzemplo de malsukcesa humuro bazita sur naciaj stereotipoj. Restas demando, ĉu oni ne faru komparojn kun komunikado en etnolingvoj dum similaj renkontiĝoj por vidi, kiomgrade la komunikado en Esperanto estas “pli ludema”.

Por ĉapitro 21 la aŭtoroj prave adoptas la sciancan priskriban perspektivon kaj forlasas la preskriban diskuton, ĉu oni rajtas uzi frazeologiaĵojn en Esperanto. La observoj kondukis al la konkludo, ke la Esperanta parolkomunumo aprezas lingvan kreivon. Oni citas enketon de Prodromou (2007), ke kreiva uzo de frazeologiaĵoj estas akceptata de plimulto de respondantoj informitaj, ke ĝin produktis denaska parolanto, dum sama kreivo de nedenaska parolanto estas opiniata kiel eraro. Tion evitas la Esperanta

komunumo; venas tamen demando, ĉu la respondantoj same aprezus la kreivon de komencanto.

Vekas scivolemon ankaŭ sintenoj al akĉentoj. Bona prononco en Esperanto estas internacia prononco, kiu ne malkaŝas la gepatran lingvon de la parolanto. Oni povas supozi, ke forta akĉento estas kritikata en Esperanto. Tiaj observoj ekzistas por minoritataj lingvoj – ne-denaska akĉento de novaj parolantoj, eĉ se bonaj, estas malhelpo por esti akceptita kiel “vera” parolanto (p. 309). Ĉu do bona Esperanto-parolanto kun forta akĉento ne estus vidata kiel neposedanta la lingvon?

La lasta ĉapitro de la 4a parto kronas la analizojn: ĝi prezentas la studon de komunikado en E@I, kiu ĝenerale konfirmas la antaŭajn konkludojn. Interesa por la leganto estas certe la komparo kun la angla – eĉ se ĝi ne estas la celo de la libro. Evidentiĝas, ke Esperanto estas uzata ankaŭ ekster laborrilataj situacioj (eĉ ofte inter samlingvanoj) kaj kondukas al pli kunlaborema, malferma etoso.

La kvina parto estas prezento de la konkludoj – ne nur simpla resumo pri la funkciado de Esperanto kiel interlingvo, sed ankaŭ gravaj rimarkoj pri ĝia komunuma valoro. Lernantoj de Esperanto kiel fremda lingvo fariĝas legitimaj parolantoj, “kunposedantoj” de ĝi.

La libro pentras kompleksan bildon de Esperanto kiel funkcia lingvo. Sendube la aŭtoroj sukcesis pleni la scitruon, kiun ne multaj profesiaj lingvistoj antaŭe ŝatis pleni – foje fakte tute neglektante ĝian ekziston. Plie – kaj parte eble iom neantaŭvidite – la esploroj faritaj por pli bone ekkoni la fenomenon de planita lingvo havas grandan signifon por la kampo de lingvafrankaa komunikado, ĉar ili montras, ke la karaktero de komunikado dependas de la uzata lingvo.

Mi esperas, ke dank’ al simile altnivelaj sciencaj verkoj en la estonteco oni ne plu devos prezenti Esperanton samvice kun universalaj aŭ hollywoodaj lingvoj kaj esperantologion kiel branĉon de interlingvistiko. Mi mem tro ofte komencas miajn artikolojn per la sama klarigo, kio estas Esperanto kaj kiel ĝi funkcias. Nun estos tre simple direkti interesitojn al la ĉi tie recenzata libro kiel fidinda fonto de scio.

## Bibliografio

- Lindstedt, Jouko. 2022. “Imitinda lingvistika priskribo de Esperanto.” *Libera Folio* 25 de Oktobro 2022. <https://www.liberafolio.org/2022/10/25/imitinda-lingvistika-priskribo-de-esperanto/> (19.05.2023)
- Prodromou, Luke. 2007. “Bumping into creative idiomaticity.” *English Today* 23 (1): 14–25. <https://doi.org/10.1017/S0266078407001046>

Stria, Ida. 2017. "Haben Esperanto-Sprecher ein gemeinsames Weltbild? Zu den Ergebnissen einer Fragebogenstudie." En *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2017*, redaktis Cyril Brosch kaj Sabine Fiedler, 103–110. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag.

## **Pri la recenzanto**

Ida Stria doktoriĝis pri aplikata lingvistiko kaj diplomiĝis pri interlingvistiko kaj esperantologio ĉe Adam Mickiewicz Universitato en Poznano, Pollando. Ŝi esploras Esperanton kadre de kultura lingvistiko kaj socilingvistiko. Ekde 2016 adjunkto ĉe la Universitato de Varsovio; ŝi ankaŭ kontribuas al Interlingvistikaj Studoj kaj interlingvistika specialiĝo ĉe AMU.

Retadreso: i.stria@uw.edu.pl

ORCID-numero: 0000-0002-7715-0758

## **About the reviewer**

Ida Stria received her doctoral degree in applied linguistics and graduated in interlinguistics and Esperanto studies at Adam Mickiewicz University in Poznan, Poland. She researches Esperanto within the framework of cultural linguistics and sociolinguistics. Since 2016 assistant professor at the University of Warsaw. She also contributes to Interlinguistic Studies and interlinguistic specialization at AMU.

## **O recenzentce**

Ida Stria uzyskała doktorat z lingwistyki stosowanej oraz ukończyła Studia Interlingwistyki na Uniwersytecie im. Adama Mickiewicza w Poznaniu. Bada Esperanto w ramach lingwistyki kulturowej i socjolingwistyki. Od 2016 r. jest adiunktem na Uniwersytecie Warszawskim. Wykłada także na Studiach Interlingwistyki oraz specjalizacji z zakresu interlingwistyki na UAM.